LSG FORUMO

nr-o 149
(1/2014)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

## Kontraŭ gejfobio:




*Google ĉielarkkolore salutas la olimpikajn ludojn en Soĉi/Ruslando*

## SALUTVORTOJ DE LA PREZIDANTO

Saluton! Mi scias, kiom gravas FORUMO por LSG kaj ĝojas (kiel vi) pri ĝia re-apero. Ĉi-numere vi legos (inter aliaj aferoj) pri gejfobio kaj egala ez(in)iĝo. Se vi volas buntan, aktualan FORUMOn, *vi* devas verki ion por ĝi.

Krom FORUMO nun LSG ankaŭ havas paĝojn ĉe Google+ kaj Facebook (vi trovos la QR-kodojn ĉi numere por direkti vin al tiuj paĝoj). Mi esperas, ke tio varbos pli da membroj kaj samtempe helpos rikolti ideojn por FORUMO. Krom nia kerna laboro de socia reto kaj novaĵejo por la Esperanta GLAT-komunumo, LSG plenumas siajn aliajn celojn per diskuto pri GLAT-rajtoj en la ĝenerala Esperanto medio kaj mencio pri Esperanto inter la ekster-movada GLAT-komunumo. Mi esperas, ke ni eĉ pli aktivos estontece.

Ĝis venont-numere,

Randy

Cetere:– FORUMO estas via bulteno kaj dependas de viaj kontribuoj. Bonvolu pripensi verki por FORUMO.

Memoru: – Se vi planas esti ĉe la UK en Bonaero, jam estas tempo pripensi aktivi tie por LSG. Kontaktu nin se vi volas voluntuli kaj/aŭ nur renkonti la lokan GLAT-aron.

**KOLOFONO:**

FORUMO estas informilo por membroj de LSG, la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

Interrete: http://lsg-esperanto.org

Membriĝo: ĉe la sekretario

kotizoj: 12 € por 1 jaro / 30 € por 3 jaroj / 300 € por dumviva membreco

Prezidanto: Randy DEAN (laprezidanto@gmx.net)

Sekretario kaj kasisto: Rolf KOEHLER (lasekretario@gmx.net) kaj (lakasisto@gmx.de)

LSG, Rolf KÖHLER, Bergstr. 78, DE-01069 Dresden, Germanio

Redaktanto de tiu numero: Wolfgang KIRSCHSTEIN (laredaktanto@gmx.net)

Estraranoj:
Harry BARRON (phsb@orange.net)
Francis SOGHOMONIAN (fsoghomonian@yahoo.fr)
(trio@tio.net) Ed WILLIGER

Sendu abunde kontribuojn por via membrogazeto FORUMO antaŭ la 1-an de aprilo 2014 al: laredaktanto@gmx.net aŭ al la helikpoŝta adreso de la sekretario.

*Nepre ne kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono ne estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio !*

# TRA LA MONDO

## IKEA FORIGAS LESBAN PARON DE RUSA ELDONO

IKEA estis avangarda, kiam ili en 1994 uzis samseksemulojn en sia varbado, spite al minacoj de konservativuloj. Nun ili agas male, ĉar ili forigas artikolon de angla lesba paro el ruslingva eldono de sia magazino *Live.* Rusoj ne legos pri Clara kaj Kirsty kaj kiamaniere ili uzas meblojn de IKEA en sia hejmo. La kialo estas la fifama gejfoba leĝo en Ruslando, kiu malpermeas informi malpliaĝulojn pri "netradiciaj formoj de seksumado" – pli vaste konata kiel leĝo kontraŭ "geja propagando". IKEA argumentas, ke sia magazino estas por familioj kaj sekve ankaŭ malpliaĝuloj riskas ricevi informojn pri la paro. Anstataŭ rusoj legis pri loĝado en ege malgranda spaco.

W




*Clara kaj Kirsty estas tro danĝeraj por rusaj infanoj kaj gejfoboj*

## ALAN TURING AMNESTIITA POST 60 JAROJ

Moderna komunikado ne estus ebla sen Alan Turing (1912-1954). La prapatro de modernaj komputiloj, kiu memmortigis sin, ĉar li estis gejo.

Danke al la laboro de Turing en la ŝtata "Stacio X" de Bletchley Park, la angloj sukcesis dum la Dua Mondmilito rompi la ĉifron, kion uzis la naziistoj por sia komunikado. Li ankaŭ okupiĝis pri artefarita inteligento.


En 1952 Turing komencis rilaton kun Arnold Murray, 19-jara senlaborulo. Konatulo de Murray perforte enrompiĝis en la domo de Turing. Li raportis tion al la polico kaj dum la esplorado ili malkovris la naturon de la rilato inter Turing kaj Murray. Tiutempe en Britio ĉiuj seksaj rilatoj inter viroj estis malpermisitaj laŭ leĝo de la jaro 1885. Turing sekve estis kondamnita kaj povis elekti inter karcero kaj traktado per virina hormono estrogeno, la tiel-nomita kemia katro. Li elektis la "terapion", sed tiu ne nur ŝanĝis la fizikon sed ankaŭ la psikon de Turing. Li deprimiĝis kaj en 1954, kelkaj semajnoj antaŭ sia 42-a naskiĝdatreveno li ĉesis sian vivon per cianido.

En 2009 la brita ŝtato posthume petis pardonon ("Vi estus meritanta pli bone"), sed la ministro pri justico tamen ne nuligis la kondamnon, ĉar tiu ja estis konforme kun tiutempo valida leĝo kaj Turing ja sciis, laŭ ilia argumento, ke ekzistis punoj por samseksa amorado.

La 24-an de decembro 2013 la brita reĝino amnestiis Turning.

Gejaj aktivuloj kritikas, ke la amnestio validas nur por Turning kaj ne por 50000 similaj kazoj en Britio. La batalo ankoraŭ ne finis.

W




*Alan Turing – estus meritanta pli bonan vivon*

## GEJFOBO ESTRAS RUSAN NOVAĴAGENTEJON


Rusa prezidento Putin nun eĉ pli kontrolas la amaskomunikilojn en Rusio, kiuj jam plejparte estas lojala al lia reĝimo. Ekde januaro 2014 funkcias la ŝtata novaĵagentejo "Ruslando hodiaŭ", kies estro estas Dmitri Kiseljov. Li estas inter alie konata por diversaj gejfobaj eldiroj.

Jen kelkaj vortoj de tiu memdeklarita spertulo pri gejaj aferoj: "Ni havas la samam problemon kun gejoj, kiuj kondutas provoke. Ili kondutas kiel vikti-

moj. Ili provokas situaciojn en kiuj ili aperas kiel viktimoj. Neniu emas ami ilin tiom kiom ili volas. Agreseme ili altrudas siajn valorojn de minoritato. La socio konbtraŭas memkompreneble en diversaj formoj, kelkaj el ili eĉ brutalaj."


Tiun "brutalan rebaton" de la socio oni povas studi en la interreto. Tie krimuloj montras atakojn kaj humiligojn de gejaj kaj eble nur laŭdire gejaj personoj. Ili paradas senmaske, ĉar ili evidente ne bezonas timi ion ajn de koruptaj policaj kaj ŝtataj instancoj.

*(Noto: La redaktanto volis prezenti kelkajn ekzemplojn de tiuj atakoj por la reta eldono de FORUMO, sed dume la estraro daŭre diskutas (?), ĉu eblas havi tian pliriĉigon en nia retspaco.)*



*Maksim Marzikeviĉ (konata kiel "Tesak" – ĉasista tranĉilo) kaj cinika iniciatinto de "Occupy pedofilio" humiligas pliajn viktimon. Serĉu liajn agojn en la la rusa klono de Facebook, vk.com*

La reputacio de Ruslando estas jam serioze makulita. Kelkaj politikaj altranguloj decidis bojkoti la Olimpikaj Ludoj en Soĉi pro la duba rilato de la putina reĝimo al homaj rajtoj. Por ripari ion Putin donis intervjuon kaj asertis, ke gejoj ja povas fari kion ajn – se nur "ili ne tuŝas infanojn". Krome li eldiris, por montri sian toleremon, ke li ŝatas la muzikon de Elton John, spite al ties seksemo …




*Gejfobo de la Jaro. La rusa prezidento plene meritas tiun titolon.*

Tio tamen estas tre malproksime de la vero. La ekzemploj jam abundas. Jen estas la ĵurnalisto Aleksander Suturin de la magazeno Molodoj Dalnevostoĉnik, kiu publikigis intervjuon kun maldungita instruisto Aleksander Jermoŝkin el la urbo Ĥabarovsk. En tiu urbo iu Movado kontraŭ Seksaj Perversecoj zorgis pri la maldungo de li

por ke infanoj ne havu la impreson de "netradicia seksumado estas tiel normala kiel la tradicia." En la intervjuo la instruisto diris: "Mia tuta ekzisto efike pruvas, ke samseksemo estas normala." Kaj tio jam estas geja propaganda en Rusio …




*Civila policano ĉasas gejan aktivulon – ĉiutaga evento en Ruslando*

Laŭdire la leĝo protektu malpliaĝulojn, sed kion fari, se ankoraŭ plenaĝa individuo faras tian "propagandon"? En Djatkova, 300 kilometrojn for de Moskvo estas 14-jaraĝa sola kuraĝa lernejantino. Sole ŝi protestis kontraŭ tiu leĝo. Tuj la lokaj gefoboj telefonis al ŝia hejmo kaj al la lernejo. Ili postulis ŝian forigon de la lernejo por eviti, ke ŝi povas komuniki sian vidpunkton al kunlernejanoj. Ŝtata komisio por la protekto infanoj rekomendis, ke ŝi iru al psikiatro. Eble la lokaj instancoj surprizĝis pri la mondskala eĥo, ĉar la direktoro de la komisio indikis al Maria, ke ili ne intencas plu sekvi la kazon.

*Ni observas,kiamaniere kondutas la reĝimo dum la olimpikaj ludoj kaj raportos pri tio en la sekva eldono de Forumo.*

W



**GEJFOBOJ HAVAS UNU PLIAN MALAMIKON**

Sporto ĝenerale ŝajnas estis gejfoba regiono – almenaŭ tio estas ĝia reputacio. De tempo al tempo tamen elŝrankiĝas famas iu pli aŭ malpli sportisto. Nun la germane piedpilkisto Thomas Hitzlsperger publike agnoskis, ke li estas samseksemulo. Oficialaj istoj de la piedpilka unio kaj ankaŭ kolegoj nomis tiun paŝon kuraĝa, do ŝajne esti geja en tiu medio tamen ne estas tiel normal afero, kiel ili postulas en siaj eldiroj.

Hitzlsperger komprenas sian elŝrankiĝon kiel fino de lia memtrovo. Dum ok jaroj li estis edzigita kaj nur post la eksedziĝo li komencis kompreni, ke li havis seksajn sentojn por viroj. Li volis jam dum sia aktiva kariero publike anonci sian seksan

preferon, sed tiam aliaj kolegoj malkonsilis al li fari tion.



*Thomas Hitzlsperger – piedpilkisto kaj gejo*

Hitzlsperger volas per tiu paŝo al la la publiko kuraĝigi pli junajn kolegojn.
La sentoj de tiaj junuloj priskribis eksa-piedpilkisto Marcus Urban en sia membiografio "Kaŝludanto" (de 2007). Li rezignis pri profesia kariero pro la gejfoba etoso en la kluboj. "Geja" estis la kutima etikedo por ĉio ajn nedezirebla kaj malagrabla – geja vetero, geja pilkpasigo kaj tiel plu. Dum piedpilko viroj estas en intensa fizika kontakto kaj ŝajnas, ke ili bezonas per virseksisma sinteniĝo rebati la eblan impreson, ke povus esti pli ol sportema kunestado inter ili.
Tiaj senpripensaj ofendoj kaj humiligoj vere malfaciligas elŝrankiĝojn de ajna junulo – ekzemple en lernejoj. Regiona registaro en Germanio tial planas eduki junulojn al akceptado de homa plurfaceta seksemo. Tie la eklezioj, kiel kutime tuj kaptis la ŝancon, protesti kontraŭ "doktrini junulojn en seksaj aferoj". Ankaŭ konservativuloj subtenis la iniciaton kontraŭ toleremo de minoritatoj. Ili asertas, ke la lernejo postulas la samvaloron de netradiciaj interhomaj seksaj rilatoj, sed intence prisilentas la negativajn efikojn de samseksemuloj – soleco kaj pli ofta memmortigo kaj kompreneble ili tiel montras, ke ili ne komprenas la diferencon inter kaŭzo kaj efiko. Ili ankaŭ malagnoskas la veran efikon de malfermaj aliancoj inter samseksemuloj kaj tiuj kun heteronorma orientiĝo: Studo el Kanado montras, ke aktiva iniciato kontraŭ molestiĝoj malhelpias memmortigojn en ambaŭ grupoj. (Fonto: *International Journal of Child, Youth, and Family Studies)*
Dum ni ofte aŭskultas, ke jen kaj tio estas plia paŝo al normaliĝo de gejoj en en la socio, ni tamen povas konstanti, ke la vojo ĝis vera normaliĝo ankoraŭ estas longa kaj dura.
Hitzlsperger esperas, ke li povas taŭgi kiel modelo por aliaj, dume li fiere konstatas en intervjuo, ke gejfoboj nun havas unu plian malamikon.


W



## KELKAJ ELŜRANKIĜOJ DE LA JARO 2013





Jason Collins estas aktiva profesia korbpilkisto. "Vivi kun tiu mensogo kaŭzis al mi multe da ĉagreno." Estinte pli juna, li opiniis, ke li devis sekvi la heteronorman vivostilon, havi fianĉinon kaj infanojn. Sed li decidis, ke li ne volis edziĝi por falsaj kialoj. Collins ankaŭ klarigis, ke numero 98 sur lia trikoto estas por homaĝi Matthew Shepard, gejo, kiu estis murdita en 1998 de gejfoboj. (La sufero kaj mudiĝo de Matthew estis siatempe inspiris al leĝo kontraŭ krimoj pro malamo)
Nuntempe Collins estas sen kontrakto.




Tom Daley, angla subakviĝanto, deklaris en YouTube, ke li ankoraŭ ŝatas knabinojn, sed li fianĉiĝis kun alia viro. "Neniam mi estis pli feliĉa en mia vivo."



Wentworth Miller estas la stelulo de la televida serio "Prison Break". En 2013 li rakontis pri sia vivo en la "ŝranko" kaj ke li plurfoje provis meti finon al sia vivo. "Se iu demandis, ĉu tio estis krio por helpo, mi diris 'ne'. Vi nur krias por helpo, se vi kredas, ke estas helpo por kio vi povas krii."



Raven-Symoné Pearman, usona kantistino kaj aktorino, deklaris en Twitter, ke si estas lesbo.



Troye Sivan, kantisto kaj kiel aktoro plej konata por sia rolo en *X-Men Origins* kaj avida uzanto de sociaj medioj publikigis en video, ke li estas gejo.




Anton Krasovski, rusa televida ĵurnalisto elŝrankiĝis dum rekta elsendo en la rusa televida kanalo *Kontr TV*.
Li diris: Mi estas gejo kaj homo same kiel Putin kaj Medvejev." Li estis maldungita la saman tagon.

Maŝa Bast, rusa advokatino kaj ambaŭseksema transĝenrulino, prezid-antino de Asocio de Rusaj Advokatoj por Homaj Rajtoj elŝrankiĝis, ĉar ŝi ne "simple povis resti sidanta kaj fari nenion".



*Kompilis W*

## EDZ(IN)IĜO DUOBLIĜOS EN NUR UNU JARO

La Usona plejsupra kortumo faris decidojn en du gravaj procesoj merkrede la 26an de junio, 2013, kiuj renversis la federalan Defense of Marriage Act (DOMA = Leĝo por la Defendo de Geedziĝo) kaj aktuale (re)leĝigis edz(in)iĝon en Kalifornio. Tiuj estas la lastaj leĝaj kaj leĝdonaj venkoj por subtenantoj de edz(in)iĝo mondskale.

Ekde la 1a de aŭgusto en usono edz(in)iĝo estos leĝa en Kalifornio, Delavaro, Majno, Marilando, Minesoto, Rod Insulo, kaj Vaŝingtono - ĉiuj ŝtatoj, kie ne estis leĝa antaŭ jaro.

Estas 59 milionoj enloĝantoj en tiuj sep ŝtatoj, do la loĝantaro de usonaj ŝtatoj, en kiuj edz(in)iĝo estos leĝa estos duobligita ene de jaro. Je la komenco de la pasinta jaro, edz(in)iĝo estis leĝa en nur ses ŝtatoj kaj la Distrikto Kolomba, kun loĝantaro de 35 milionoj.

La leĝeco de edz(in)iĝo kreskas same rapide tutmonde. Ĝi leĝiĝis jam ĉi jare en Brazilo kaj Francio kaj ekde aŭgusto estos leĝa en Urugvajo kaj Novzelando.


Pasintmonate estis decido de brazila juĝistaro, kiun oni ĝenerale taksas kiel leĝigo de edz(in)iĝo, sed kiu eble estos apelacita, kaj kiu gravas por ĉi matematiko. Brazilo havas 194 milionoj enloĝantoj - pli ol la 169 milionoj en la naŭ eŭropaj landoj kun leĝa edz(in)iĝo. La lasta decido sekvis tiujn, kiuj leĝigis edz(in)iĝon en pli ol dekdu brazilaj ŝtatoj.

| Leĝa edz(in)iĝo en | aŭgusto 2012 | Leĝa edz(in)iĝo ekde | aŭgusto 2013 |
|---|---|---|---|
| Lando/ŝtato | Enloĝantoj | Lando/ŝtato | Enloĝantoj |
| Argentino | 41,350,000 | Brazilo (cetera) | 165,071,709 |
| Belgio | 11,166,000 | Francio | 63,821,000 |
| Brazilo | | Novzelando | 4,468,200 |
| Alagoas | 3,165,472 | Urugvajo | 3,297,000 |
| Esperito Santo | 3,578,067 | Usono | |
| SantaRita | 36,150 | Kalifornio | 38,041,430 |
| Sapucai | 34,755,634 | Delavaro | 917,092 |
| Kanado | 5,612,000 | Majno | 1,329,192 |
| Danio | 324,000 | Marilando | 5,884.563 |
| Islando | | Rod Insulo | 1,050,292 |
| Meksiko | 8,864,370 | Vaŝingtono | 6,897,012 |
| Distrito Federal | 1,440,814 | | |
| Kvitana Roo | 16,795,000 | | |
| Nederlando | 5,077,000 | | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Norvegio | 10,609,000 | | |
| Portugalo | 52,982,000 | | |
| Sudafriko | 45,858,000 | | |
| Hispanio | 9,593,000 | | |
| Svedio | | | |
| Usono | 3,590,347 | | |
| Konetikuto | 632,323 | | |
| Distrikto | 3,074,186 | | |
| Kolomba | 6,646,144 | | |
| Iova | 1,320,718 | | |
| Masaĉusetso | 19,570,261 | | |
| Novhampŝiro | 626,011 | | |
| Novjorko | | | |
| Vermonto | | | |
| **Sumo 2012** | **288,777,364** | **Sumo ekde 2013** | **296,156,624** |

Pli frue ĉi jare Francio, kun 64 milionaj enloĝantoj, iĝis la plej granda eŭropa lando kun leĝa edz(in)iĝo, kaj la plej granda en la tuta mondo kiu faris per parlamenta agado.

Ekde aŭgusto estos proksimume 585 milionaj homoj loĝantaj en landoj aŭ ŝtatoj, kie edz(in)iĝo leĝas. Tio estas preskaŭ duoble la 289 milionoj de aŭgusto 2012.




**Eŭropo Kanado Usono Sudafriko kaj Novzelando Meksiko Sudameriko**


Tamen tio estas nur 8% de la monda enloĝantaro. Neniu lando en Azio, kiu enhavas pli ol duono de la homoj en la mondo, leĝigis edz(in)iĝon.
Sed estas la tiel-nomata Nova Mondo, kiu antaŭiras. El la 585 milionoj homoj, kie edz(in)iĝo estos leĝa en aŭgusto, proksimume 360 estas en la Amerikoj.
Kun la reveno de leĝa edz(in)iĝo en Kalifornio, Usono superos Eŭropon en havebleco de leĝa edz(in)iĝo. Ekde aŭgusto 95 milionaj usonanoj el 314 milionoj - proksimume 30% - loĝos en ŝtatoj kun leĝa edz(in)iĝo. En Eŭropo la numero estas 169 milionoj el 736, aŭ 23%.

[Post la preso de la originala artikolo, estis eĉ pli da landoj kaj subŝtatoj, kiuj egaligis iliajn leĝojn pri edz(in)iĝo.]

*Artikolo el New York Times, tradukita de Randy*

## LETERKESTO

En Forumo 148, LSGano 200 priskribas la modernan katolikan eklezion kiel "falsaj fratoj, fariseaj pastroj." Tie ĉi la a-vorto "farisea" temas pri sekto de judoj, kiuj preferis demokratian regadon fare de spertuloj pri juda leĝo, anstataŭ aristokratoj (pastroj) kaj reĝoj. La farisea pens-maniero naskigis rabenan judismon, kiu pli ŝatis lernadon ol fidon, agadon ol kredon.
La judoj ekde la farisea epoko estis universe legoscipova, lasante sin fariĝi speciala klaso de intelektuloj, tradukistoj, komercistoj kaj profesiuloj. Kiam la Eŭropaj aristokratoj forbaris la judojn el "estimindaj" industrioj, la judoj ekpraktikis novajn industriojn malpermesitajn al kristanoj, ekzemple bankojn kaj, pli poste, filmojn.Ĝuste tiuj judaj intelektoj (multaj el kiuj fariĝis ateistoj pro tia sinteno, kian nur povus doni universa legoscipovo kaj jarcentoj da sperto pri persekutado) misproporcie kontribuis al la scienca, morala, etika kaj ekonomia kadro, kiu estimas ĉiujn personojn sendepende de religio, raso, aĝo aŭ seksa orientiĝo.




Nuntempe 81 elcento da usonaj judoj subtenas samseksan geedziĝon kaj Israelo jam delonge permesas ĝin. Oni

ne devas tro serĉi por trovi komunumojn nur por gejaj judoj. Sekve mi kredus ke la a-vorto "farisea" ĝuste signifu "intelekta", "justa" aŭ "demokrata", anstataŭ "hipokrita".
Amike, Geja homarano

**LIBROANONCO**

Telenio (originala titolo: Teleny or the Reverse of the Medal), atribuita al Oscar Wilde tradukita de Detlef Karthaus kaj eldonota de Mondial 2012-2013.

Klasifiki la romanon *Telenio,* la duan gejan erotikan romanon en la angla lingvo, simple kiel geja pornografio estus subtaksi la spriton kaj la genion de Oscar Wilde, al kiu tiu romano estas atribuita. Ni memoru ke Wilde diris en *La portreto de Dorian Grey*, "Ne ekzistas morala libro aŭ malmorala libro. Libroj estas aŭ bone verkitaj aŭ malbone verkitaj. Tio estas ĉio."
Oni povas rigardi ĉi tiun romanon kiel apologio de samseksemo, kiun la verkisto plenumas kun humoro kaj malpieco, en la stilo de angla romano de la 19a jarcento, referencante la grekan mitologion, la anglan literaturon kaj citante multfoje la Sanktan Biblion.
*"Lasu la moraliston klarigi post tio, kian damaĝon ni kaŭzis, aŭ la leĝiston, kiu suferigus nin la saman punon kiel al la plej malbonaj krimuloj, la malutilon kiun ni kaŭzis al la socio."*



La angla eldono de 1966 estis ankoraŭ strikte cenzurita. En ĝia antaŭparolo oni sugestas ke interesatoj sin turnu al la Brita Muzeo, kie restas kopio de la unua necenzurita (kaj privata) eldono. La eksplicita versio en la angla aperis en 1984, kaj tiu estas la fonto de la Esperanta traduko.
Kvankam verkita en 1893 la temo estas ankoraŭ aktuala en 2012 kiam oni vidas, ke en iuj landoj la interedziĝo de samseksemuloj estas laŭleĝa kaj protektita rajto dum en aliaj landoj samseksagoj estas laŭleĝe punataj. Eĉ en landoj kie gejoj havas la protekton de la leĝo la situacio ankoraŭ ne estas findiskutita pro tio, ke konservativuloj, ofte pro sia religio, vidas en samseks-emo mortpekon aŭ disfalon de la socia ordo. La aŭtoro kontraŭas tiujn vidpunktojn per citaĵoj el la Biblio, kaj avertas la legantojn al la multaj okazoj de diboĉo en tiu sankta libro. Per

piednotoj la tradukisto notas la Bibliajn citaĵojn, al kiuj la verkisto aludas.
La romano la ĉefrolulo konscias pri sia seksemo kaj komencas akcepti ĝin. "Mi ankaŭ havas kelkajn trajtojn de elŝrankiĝa rakonto. En la unua fazo de ĉi tiu procezo baraktis vane kontraŭ mia pasio, kaj nun mi cedas al ĝi, ne pasive, sed avide, ĝoje."



En la dua fazo li fine priparolis tion kun konfidenculoj kaj akceptiĝas en ties rondoj. *"Mi prezentos vin al multaj afablaj fratuloj, kiuj ĝojos ekkoni vin, kaj kiuj jam de longe miris, ke vi ne estas unu de ni."*

Ĉi tiuj du fazoj reprezentas la fonon de la romano, kiu temas pri la amo inter la pianisto Reneo Telenio kaj lia amiko Kamilo des Grieux. La tria fazo de elŝrankiĝo, malkaŝi sian seksemon en publika spaco, estas pli-malpli plenumita per la prologo de la verkisto. "La raporto kiu sekvas ne estas, do, romano. Ĝi estas vera historio, la dramecaj aventuroj de du junaj kaj belaj homoj, nervozegaj, kun rafinitaj temperamentoj, kies mallonga ekzisto estis falĉita de la morto, pro diboĉaj pasioj, kiuj malfacile estos komprenataj de la plimulto de ordinaraj homoj."

Averto al la leganto: Ĉi tiu verko eksplicite priskribas seksumadon, alisekseman, samsekseman, zoofilian ktp.
Oni povas vidi kelkajn aliajn citaĵojn en Vikicitaro:
**http://eo.wikiquote.org/wiki/Telenio**

*Detlef*

## BHARATO REENKONDUKAS LEĜON EL LA 19-A JARCENTO

En Bharato (Hinda Unio) samseksamo denove estas krimo.
En 2009 kortumo deklaris, ke konsenta amoro inter plenkreskuloj ne estas krimo. La Supera Kortumo tamen deklaris, ke leĝojn nur povas nuligi la leĝdonato, do la parlamento. Tiel ili reenkondukis la antikvan paragrafon 377 de la puna kodekso de la 1860aj jaroj. Laŭ tiu leĝo nur amorado kun peniso en vagino estas laŭ la "ordo de la naturo". La Supera Kortumo do ne sekvis la argumenton, ke la leĝo estas kontraŭ la konstitucio.




Vere, la leĝo ne estis uzita tre ofte, sed ĝi ebligis ĉikanon fare de policanoj. Advokato Aditya Bondyopadhyay klarigis, ke la polico povas perforte eniri domon sub la preteksto malhelpi kriman ago la paragrafo 377. Li ankaŭ memoras aferon en Lucknow, kie sep personoj estis arestitaj. Li sukcesis liberigi kvar akuzitojn post 47 tagoj, dum unu restis en karcero dum ok monatoj – fine la polico rezignis pri ĉiuj akuzoj.

Dume ni atendas, ĉu la parlamento nuligas la leĝon el la epoko de la koloniistoj. *W*




## PANJO, MI ESTAS GEJO
### Eseo de Binyavanga Wainaina



*Lastatempe ondo de gejfobio inundas Afrikon. Niĝerio punas per vipbatoj, same e Sudano (ĝis 100 batoj). En Mozambiko atendas aŭ frenezulejo aŭ labora kampejo. En Ugando atendas vivolonga enkarceriĝo. Kaj en Maŭretanio amo inter du viroj povas fini per publika ŝtonumado. Nur en Sudafriko gejoj estas protektitaj de la leĝo. Nun tie estas eĉ Partio Por Egalaj Rajatoj, kiu batalas aktive por la rajtoj de gejoj kaj lesboj.*

*FORUMO dokumentas la kuraĝan eseon de la kenia verkisto Binyavanga Wainaina. Li reagas per tiu elŝrankiga konfeso al la lastatempaj kontraugejaj leĝoj en Afriko.*

**1a de julio 2000.** Tio ne estas korekta raporto de tio kio okazis.

"Saluton panjo". Miu metas mian kapon al ŝia ŝultro. Hodiaŭ ŝi elspiros. Ŝi kuŝas en hospitala lito en Kenyatta Hospitalo. En intensa sekcio, kie ŝi estas intense estas flegita. Ĉi-foje mi ne detruas ĉion en Suda Afriko kun mia kutima kaosa maniero. Mi volas esti tie ĝustatempo antaŭ ŝia morto.

Mi prenas la manon de mia mortanta patrino kaj levas ĝin. Estas ŝveliĝo. Ŝi suferas de diabeto kaj ŝiaj organaoj estas malfunkciontaj.




"Saluton panjo" mi flustras en ŝian orelon. Ŝi estas veka kaj aŭskultas en trankvila kaj ama maniero. Mi sentas ŝian spiron. Ankoraŭ ŝi estas en tiu mondo, sed baldaŭ ŝi estos en alia. Ŝi kapablas elteni ĉion. Ŝia spiro estas malrapida, sed trankvila. Mi volas flustri al ŝi kun mia spiro, kaj ŝi aŭskultos, spite ŝi ne povas aŭdi min.
"Panjo", mi diras, "paaanjo?". Spiro, sono de mia buŝo dum ŝi enspiras kaj elspiras. Mia koro ĝemas kaj mia kapo krias.
Mi ne prononcas la vorton 'gejo' antaŭ mia 39a vivojaro.
"Mi neniam rakontis al vi, kio estas en mia koro. Vi neniam demandis."
Tion diras miaj pensoj. Mi ne uzas la buŝon. Sed ŝi rimarkis, ke mia koro transsaltis. Ĉu ŝi enlasos min?
Mi neniam rakontis al iu ajn. Mi ne fidis vin, panjo. Mi alprenas kuraĝon, prenas ĝin de mia interno kaj flustras klare kaj precize en ŝian orelon:
"Panjo, mi estas gejo".

**Julio 2000**. Tio ne estas korekta raporto de tio kio okazis.
Mi loĝas en Sudafriko kaj ne vidis mian patrinon dum kvin jaroj, spite mi scias, ke ŝi estas malsana. Mi timas kaj hontas. Baldaŭ mi havos 30 jarojn. Estas risko, ke mi neniam rajtas reveni, se mi forlasas la landon. Sed mi pretas movi montojn por vidi ŝin.
Ŝi estas en Nakuru en kritika kondiĉo kaj ili volas translokiĝi ŝin al Kenyatta Hospitalo en Nairobi, kie ŝi povus ricevi dializon kaj kie aro da spertuloj estas preta por akcepti ŝin.
Parencoj ariĝos por vidi ŝin, ŝiaj organoj estas malfunkciontaj kaj la maŝinoj helpos ŝin. Mi volas rapidigi por fiksi ĉiujn aranĝojn por ebligi la vojaĝon de Sudafriko. Mi bezonas du pliajn tagojn antaŭ ol mi povas kapti aviadilon.

**1a de julio 2000**. Mia onklo alvokas kaj demandas ĉu mi sidas.
"Ŝi estas for, Ken".
Mi telefonas al mia onklino Grace por

kontakti mian patron, sed ŝi diras, ke li estas subigita de ĉagreno kaj senripoze dis kuras en sia aŭto kiel fulmo kaj tondro. Neniu aŭdas de li dum pluraj horoj.




Post tri tagoj li telefonas al mi kaj diras ke estas tro malfrue por viziti ŝin. Ŝi diras, ke mi ne vojaĝu for, ĉar li opinias, ke mi ne risku ion forlasante Sudafrikon por atendi la entombigon "Estas tro riska", li diras, "ĉar finfine vi perdos ĉion."

Sed ja temas pri mia patrino.

Mi estas 29 jarojn aĝa. Estas la 11a julio 2000. Mi, Binyavanga Wainaina, ĵuras, ke ekde la kvina vivijaro mi sciis, ke mi estis gejo. Mi neniam tuŝis viron en seksa maniero.



Dum mia tuta vivo mi seksumis nur kun tri virinoj kaj nur unu fojon mi kompleteis la agon. Estis grandioza. Sed la sekvontan tagon mi ne plu kapablis.

Nur kvin jarojn post la morto de mia patrino mi trovos viron kun donis al mi masaĝon kaj seksumis kun mi kontraŭ pago. En Earl's Court, Londono. Tiam mi volos esti libera kaj rakonti ĉion al mia plej bona amiko, kiu surprizos min estas komprenema sen kompreni min.

Mi volas rakonti al li, kion mi faris, sed mi ne volas rakonti al li, ke mi estas gejo. Mi ne diras la vorton "gejo" antaŭ mia 39a vivojaro.

Ne estas diabeto kiu mortigas mian patrinon antaŭ mi povas ekflugi. Iu, eble flegistino, ne fermis la fenestron

dum la nokto kaj tiel enlasis la amaran malvarmon en ŝian ĉambron en la Kenyatta Hospitalo.




Dekunu jarojn post la morto de mia panjo mia patro suferis de apopleksio kaj fariĝis cerbe morta. Lia koro batas dum kvar tagoj, sed mi havas nenion por rakonti al li.
Hodiaŭ estas mia 43a naskiĝtago. kj
Mi estas kvin jarojn aĝa.

Li staras en surtuto sen ĉemizo kaj lia brusto estas kovrita de ŝviteroj kaj etaj krispaj haroj. Li estas tute malstreĉita. Li havas rompitan denton kaj senmezure larĝan rideton. Mi ŝatas, ke liaj movoj estas malrapidaj kaj trankvilaj, ĉar mi ne komprenas la movoskemojn de homoj.



Mi timas kaj spasmas kiam homoj moviĝas maltrankvile kaj rapide. Li havas grandan larĝan rideton kaj flaras de dizelo. Li levigas min kaj svingas min ĉirkaŭen. Estas nur li kaj mi.
Por la unua fojo en la vivo mi estas longe for de ĉiuj aliaj kaj tio estas mirinde. Tiam venas nubon de timo, kiu volviĝas min. Se li prenas min nun, mi sekvos lin ĉien. Mi scias, ke mi ne povas fidi miajn piedojn, se li metas min suben.
Mi hontas kaj lasas lin. Mi puŝas min for de li kaj evitas lin por ĉiam. Dum preskaŭ 20 jaroj mi ne povas propra-maniere ĉirkaŭbraki aliajn virojn.



La sama sento denove venas al mi.Mi havas sep jarojn kaj ĉi-foje mi estas la pli forta. Mi staras apud golfisto en la golfklubo de Nakuru kaj mi skuiĝas kaj li donas al mi la manon.
Tiam mi estas sola en necesejo, ĉar la revenanta sento frakasis min kaj fariĝis min sola. La sento ne estas seksa, sed ĝi estas senekvivoka kaj superfortigita. Ĝi faras, ke mi sonĝas grande kaj revenas regule kiel atakoj de malario.
La sekvontaj tagoj mi estas skuita kaj la sekvontaj monatoj mi estas konfuzita. Sed mi ne faras ion pri la sento.
Mi estas kvin jarojn aĝa kaj volvas min en tapiŝon de feliĉo. Mi ne postulas multon de aliuloj. Mi estas distrita. milda kaj dankema por la amo, kion mi ricevas. Mi donas pli ol mi prenas.
Sed mi povas esti egoisma. Mi masturbas multe kaj evitas frakasiĝon kaj ne permesas, ke mia koro kreskas. Mi ne tuŝas aliajn virojn. Mi legas librojn. Mi amas mian patron tiom multe, ke mia koro komencas kreski.
Mi estas gejo.

*Enkonduko kaj traduko de W*

**ĈU NI VERKU LA HISTORION DE LSG?**

Sekvontfoje numero 150 falos en vian leterkeston. LSG pripensas fari ion specialan, eble rerigardi al nia historio.
LSG estis fondita kiam estis la Malvarma Milito. Ĉu tiam LSG havis signifon por niaj gefratoj malantaŭ la fera kurteno? Ĉu LSG ŝanĝis vivojn ebligante ligojn antaŭ la tempo de Interreto?
En la komenco estas rezisto kontraŭ LSG. UEA ne volis presi anoncojn de nia Ligo. Nun tio ŝajne neimagebla, ĉar ŝajnas preskaŭ ek Esperanto kaj samseksamo kuŝas sur la sama geno.
Lastatempe la plej longdaŭraj membroj de LSG ricevis inviton por rakonti kaj dividi siajn rememorojn. Bedaŭrinde neniu reagis. La amplekso de tiu maleĥo eĉ surprizis min. Vi ne bezonas verki ion, nur esti preta por doni informojn. Kaj vi rajtas esti anonima. Sed sen raportoj de tiuj kiuj ĉeestis, ni tamen ne povas verki nian historion.
Se vi pretas kontribui, bonvolu anonci vin ĉe la redaktejo. *W*

## ĈIJARE AŬ SEKVONTJARE

Ĝis februaro nur kvin LSG-anoj aliĝis por la ĉijara Bonaera UK. Do nur eta LSG-grupo partoprenos ĝin. Supozeble ĉiuj atendas la 100-an UK sekvontjare en Lille/Francio. Tial mi proponas, ke ni organizas nian sekvontan ĝeneralan LSG-kunvenon sekvontjare en Lille kun multe pli da partoprenantoj anstataŭ ĉijare en Bonaero. Tamen ni informos pri LSG dum Movada Foiro.

*Rolf, sekretario*



*Jam temp' esta' – nun kaj ĉiam estas oportuna tempo por vekiĝi kaj aktivi por LSG*

## EL LA REDAKTEJO

Kelkaj legantoj de la lasta FORUMO prenis la tempon kaj skribis, ke la enhavo estis varia kaj riĉa. – La redaktanto dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis al la enhava de la lasta numero, - La formulo estas simpla: ju pli de kontribuantoj, des pli da varieco.

Mi emas verki pri aferoj, kiun interesas min kaj pri kiuj mi ricevas informojn. La limo de mia sfero tiam ankaŭ estus la limo de de via FORUMO. Vi – jes, vi! – povas riĉigi FORUMOn per viaj novaĵoj kaj aliaj kontribuoj. Ne necesas plurpaĝaj kontribuoj, konciza informo ankaŭ gravas.

Alia afero estas: kion vi ŝatus legi ĉi-tie? La redaktanto ĉiam bonvenigas sugestojn kaj proponojn, denove: FORUMO ne estas por mi, sed por vi.

Dialogo ĉiam estas bona kaj plenigas FORUMOn plej rapide. FORUMO tamen ne estu bulteno, sed fariĝu "loko, kie oni diskutas pri publikaj aferoj; centro de la publika vivo".

## NIA SPACO EN LA RETO

*QR-kodo por la Facebook grupo de LSG*

*QR-kodo por la Google grupo de LSG*



*Looking – nova televida serio pri vivo kaj amoro de tri gejoj en San Francisco. "Ĉu vi jam vidis mian novan tatuaĵon?"*



*Ne ripozu – vigligu FORUMOn!*